# **Postfesta renkonto en Hotelo Von Bergen en la vilaĝo La Sagne**
organizita de Claude Gacond

Mi ricevis vivsignojn de partoprenontoj al la festo de la sabato 27a de aŭgusto 2011, kiun Svisa Esperanto-Societo kaj la Biblioteko La Chaux-de-Fonds organizos ĉe CDELI je mia honoro. Pluraj venos el foraj lokoj kaj informiĝas pri loĝeblo. Tial mi sentis la neceson organizi amikan postfestan renkonton, kiu ebligos trankvilan retroviĝon kaj reciprokan konatiĝon antaŭ la definitiva forveturo. Tiucele mi elektis agrablan kunvenejon en la Hotelo Von Bergen situanta en La Sagne, vilaĝo najbara al La Chaux-de-Fonds, kie disvolviĝis la duono de mia instruista kariero. Ĉar tiu kamparana hotelo moderpreza, sed tamen tre komforta, ne reteje kontakteblas, tial estis decidite kun ĝia estrino-kuiristino, ke ĉiuj rezervadoj de litoj, ĉambroj kaj manĝoj disvolviĝos tra mia kanalo per mia propra retadreso gacond@bluewin.ch.

Tranoktado en ĉambro unulita kun matenmanĝo kostas 120.- svisajn frankojn (tio estas ĉirkaŭ 100.- eŭroj). Samas la prezo por paro en ĉambro kun vasta geedza lito. Samas la prezo por 2 personoj en dulita ĉambro. Kelkaj ĉambroj aldone al vasta geedza lito posedas aliajn litojn, kio konvenas al grupa tranoktado je prezo de po fr. 50.- por persono (ĉirkaŭ po € 40.-). Ĉiu ĉambro posedas propan sanitarejan. Mi rezervos la litojn kaj ĉambrojn laŭ la alveno de la mendoj. Eblos alveni jam ekde la ĵaŭdo 25a de aŭgusto kaj restadi ĝis la lundo 29a de aŭgusto aŭ pli longe. Ĉiu klare rete indiku la datojn de siaj alvena kaj forira tagoj aldonante klare siajn nomojn kaj poŝtan adreson.

## **Jen la alloga programo de tiu postfesta renkonto en La Sagne**

**Sabaton 27an de aŭgusto (post la festo en La Chaux-de-Fonds)**

18h30 : **Komuna vespermanĝo** je fr 16.- (ĉirkaŭ € 13.-) : Menuo : *Potage ou salades, fricassée de poulet paysanne, roesti-légumes, flan caramel.* [Supo aŭ salatoj, kamparana frikasaĵo de kokidaĵo, regiona terpomaĵo kun legomoj, karamelaĵo. Por la vegetaranoj : *Plus de légumes et tome sur les roestis.* [pli da legomoj kaj fromaĝaĵo sur la terpomaĵo.]

20h00 : **Monodrama teatra spektaklo** *Ludoviko Lazaro* de Georgo Handzlik el Pollando, kies premiero okazis dum la 94a UK en Bjalistoko.

**Dimanĉon 28an de aŭgusto** (en la ĝardeno, se la vetero tion ebligos)

8h00-9h30 : **Matenmanĝo**.

10h00-11h30: **Interŝanĝaj kontaktoj**.

12h00: **Komuna tagmanĝo** je fr 35 (ĉirkaŭ € 29.-) : *Terrine de canard, salades. Sauté de veau marengo, nouilles au safran, vacherin glacé.* [Anasa paŝtaĵo, salatoj, bovidaĵo, safranaj nudeloj, glacia meringaĵo. Por la vegetaranoj : *Viandes remplacées par des salades avec fromage et une potée de légumes* [Viandaĵoj anstataŭitaj de salatoj, fromaĝaĵo kaj legomaĵoj].

14h00-18h00 : **Intimiĝo kun siberia pejzaĝo torfeja** dum agrabla promenado per trajna aŭ automobila vetureto al la najbara vilaĝo Les Ponts-de-Martel. (Se pluvos alia malkovro).

18h30 : **Komuna vespermanĝo** je fr 21.- (ĉirkaŭ € 19.-) : *Fondue* [Fonduo] aŭ *Salade et feuilleté de poissons et petits légumes* [Salato kaj fiŝa foliigita pastaĵo].

20h00 : **Filmo** farita de la bird-observantoj Janine kaj Alain Bauermeister-Péter el La Sagne, kiun ili titolis ***Dans la nature avec Janine et Alain*** [En la naturo kun Janine kaj Alain] kaj **kantoj** de Georgo Handzlik. (Janine frekventis mian klason, kiam mi eksperimente instruis esperanton en La Sagne meze de la pasinta jarcento !)

**Lundon 29an de aŭgusto**

**Vizito de CDELI kaj de la Biblioteko**. Ekde la 9h00 kun miaj kunlaborantoj mi deĵoros en CDELI en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds.Tiam vizito de CDELI kaj de la Biblioteko estos do ebla dum la tuta mateno. Eblos aĉeti librojn kaj akiri brokantajn librojn kaj revuojn. Post la matemanĝo en la Hotelo Von Bergen, el La Sagne mia kunlaboranto Stefano Keller trajne gvidos la vizitemulojn al CDELI.

**Partopreno sen tranoktado**
Partopreni tiun programon sen tranokti ankaŭ eblos. Tiel esperantistoj el la regiono profitu pri tio. Sed ili ne forgesu ankaŭ rete anonci sin, indikante sian poŝtan adreson kaj siajn elektojn : tutan aŭ partan partoprenon, ktp. por ke mi povu ilin nombri inter la ĉeestontoj kaj manĝontoj.

**Kelkaj plusaj informoj :**

**Trajno al La Sagne :**
El La Chaux-de-Fonds preskaŭ ĉiuhore trajno veturas al La Sagne tra bela montara pejzaĝo ekde la 6a horo matene ĝis la 23a horo vespere. Ĉar La Sagne estas vilaĝo etendiĝanta longe de valo kun 4 trajnhaltejoj, tial gravas eltrajniĝi ĉe la stacidomo **La Sagne-Crêt**, el kie la Hotelo Von Bergen marŝe foras je 3 minutoj. El La Sagne same ĉiuhore eblas trajni al La Chaux-de-Fonds.

**Per aŭtomobilo al La Sagne :**
El La Chaux-de-Fonds veturu en la direkton de Neuchâtel ne tra la tunelo, kaj post la unua supreniro je la unua vojkruciĝo trafu la direkton La Sagne.

**Mi antaŭĝojas vin renkonti.**
Claude Gacond. gacond@bluewin.ch

Kiuj ne povas retumi, tiuj skribu al mia hejma adreso :
Claude Gacond, Chevreuils 14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds.